# *Advokatoj de Lula petas en Svislando aliron al la arkivoj de Odebrecht*




Braziljo, jul 10 (RHK) La defendo de Luiz Inácio Lula da Silva prezentis peton en Svislando por aliri la originajn arkivojn de la entrepreno Odebrecht, kiuj povas alporti novajn pruvojn pri la senkulpo de la eksa prezidento a? de malle?ecoj de la operacio Lava Jato.

La? la raportistoj Jamil Chard kaj Vinicius Konchinski, de la notico-portalo UOL, la advokatoj de la fondinto de la Laborista Partio argumentas ke Lava Jato uzis manipulitajn datumojn kiam esploris la ekslaboriston de metalurgio, akuzo neglektata de la jura laborgrupo.

La raportisto de UOL precizigas ke la “defenda esploro” de la eksa gvidanto laborista petis dokumentojn al Odebrecht kaj al la Ministerio de Justico, krom iniciati konsulti?ojn en Svislando.

Lula estis komdamnita dufoje de la federacia justico de la suda ?tato de Paraná. Unu pro la nomata kazo de triplex (trioblo)  de Guarujá kaj alia pro la sidejo de Atibaia. La eksprezidento alfrontas anka? akuzon en la urbo de Curitiba pro supozataj suba?etoj al la Instituto Lula.

Lula ?iam asertis sian senkulpon fronte al ?iuj ?ar?oj de la federacia publika ministerio de Paraná. En amba? kazoj li apelacias al la superaj tribunaloj por renversigi siajn punojn.

La defendo de Lula esperas ke la “defenda esploro” povu arigi pruvojn uzotajn en la apelacioj. En Svislando la komenca pritakso estas ke la aliro al la originaj dokumentoj ebligos al la defendo de Lula kompari tiujn kun la aliaj uzitaj de la prokurorejo.

La iniciato de la advokatoj bazi?as sur regularo aprobita de la federacia konsilantaro de la advokata kolegio de Brazilo fine de 2018.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/228145-advokatoj-de-lula-petas-en-svislando-aliron-al-la-arkivoj-de-odebrecht

**Radio Habana Cuba**